CNT AIT FAI
INTERNACIA LABORIST-ASOCIO
INFORMA BULTENO
NACIA KONFEDERACIO DE L'LABORO
ADRESO: ESPERANTO-FAKO AV. DURRUTI 30
BARCELONO — HISPANIO
IBERIA ANARKISTA FEDERACIO
II-a Jaro 25 DECEMBRO 1937 Numero 12

**Federica Montseny**

# LA SCIENCO FUNEBRAS—KOMAS SOLA MORTIS

*La 2an de Decembro mortis la fama kataluna astronomo Comas Solá.*

*Solá estis valorajo pura k nediskutebla. Silente k volonte li faris de la scienco iluzion, kiu plibeligis lian vivon, honestan k fekundan. La politiko? Neniam li makulis sin per ĝies kotajo, nek genuis antaŭ la Potenco. Li vivis kiel homo integra, kulturante la florejon de sia sendependo.*

*Kun la morto de Solá la laborista klaso perdis entuziasman propagandiston de la sciencaj konoj. Li batalis en la vicoj de C. N. T. k estis fervora pulsiganto de ĉiuj ĝies kulturaj entreprenoj. "La Scienco je la servo de la popolo", estis lia devizo.*

*Ĉe la funebra ceremonio, kiu trakuris la ĉefajn stratojn de Barcelono ĉeestis miloj da laboristoj el la sindikatoj de C. N. T., formante surstrate imponan manifestacion.* Red.

Mi skribas tiujn liniojn post la ĉeesto al enterigo de la astronoma sciencisto Komas Sola. Multege da personoj, multaj flagoj. Oficialaj reprezentoj. Amaso haltanta; salutanta la ĉerkon k akompananta per sia scivolemo au sia emocio—iomel ĉio—la lastan promenon de l' majstro.

Nur unu sola momento, tamen, de emociiga impreso, de profunda belo, de spontanea k simpla impreso. La ĉerko senmova ĉe la fino de l'Pi Margall-Promenejo. La longa, senfina parado antaŭ la enterigo-prezido.

La Urba Orkestro, gvidata de Lamot de Grinjon (Lamotte de Grignon)—alia el niaj grandaj figuroj—ludas la "Funebran Marŝon" de Beethoven. K vicoj senvostaj da aŭtentikaj laboristoj trajtaj vizaĝoj de kamparanoj; bluaj vestoj de mekanikistoj; homoj kun la manĝujo k la laborilara pakaĵeto ĉemane; domkonstruistoj k helpantoj; k. c. Popolo pura, silenta, sentema, kun la pugno en la aero k la rigardo fiksita en la veturilon, kie la sciencisto sin direktas al plej suprema destino. La muziko, impona k influa, profunda k majeste trista, ligiĝas tiom perfekte kun la momento, kun la spektaklo, kun la silento, kiun nur tranĉetas la monotona flustro de la amaso silentanta k emociplena, kiu paradas, ke mia koro forte batas k miaj okuloj humiliĝas.

Poste, en trankvilo, mi pensas. Finiĝis la vicpasado k kelkaj amikoj akompanas la restojn de Komas Sola ĝis la Malnova Tombejo, kie ili ricevas akcepton. Dum mi ĉeestas la pian taskon kovri la restojn de l'granda astronomo, mi parolas kun Fabré, homo kiu akompanis Komas Sola'n ĝis la lasta sekundo, lia fidela amiko k lia helpinto dum longaj jaroj. Simpla aspekto de sciencisto, senpretenda k simpatia, kun dolĉaj okuloj k serena esprimmaniero, kvazaŭ for de l' surteraj aferoj. Li diras al mi kiom amis Komas Sola la popolon k kiom tiu kataluna popolo, granda k klera, unika en la Mondo, malgraŭ ĉio, lin rekompensis per la sama estimo. Al mi li rakontas kiom profunde, okaze de vizito de grupo da laboristoj al Observatorio Fabra, li sin sentis kontenta.

—Tiu tago estis festo por li. Senlaca, ĉiam atenta, li ŝatis ekspliki ĉion de li sciata, k laŭ plej simpla formo, al la laboristoj. Ili aŭskultis interese, sen perdi eĉ unu vorton, kun tia atento ke tio ja estis premio k ĝojo por li. Kiom da diferenco kiam vizitis la Observatorion grupoj de ignoraj studentetoj, mezklasa gejunularo, kiu ŝercis pri la aferoj, kiuj Komas Sola estimis kiel plej interesajn k plej seriozajn! Li tiam suferis en silento k foje li foriris, malhumora... En Katalunio, la popolo, la laboristoj estis reale supera klaso, laŭ sia kulturo k laŭ sia granda amo al kleriĝo.

Mi aŭskultas, k memoras mi Komas Sola'n, en tiu scenejo al li familia, traserĉante la horizonton, situita super la tero per lia rigardo de sciencisto, kun lia sindona k ampleksa opinio, per lia kutimo konsideri ĉion el la mondogrando kun kiu li tiom intimiĝas. K, tamen, tiu escepta homo sentis la dolorojn de la popolo, k ĝin amis k por ĝi li suferis, doninte al li kion li povis, sen takso k mezuro, por tuteca oferado de liaj energioj, per ŝtelitaj horoj al ripozo, ne lasante eĉ leteron por respondi, neniam rifuzante pri artikolo, neniam neante prelegopeton, malgraŭ modesto ajna de ĉiu kleriga societo. Mi memoras liajn streĉajn jarojn, kiel humila laboristo de l'inteligento. Malfeliĉa Komas Sola! La direktoro de la Observatorio Fabra, mondfama astronomo, la heredanto de l'gloro k brilo de Flamarion, eltrovinto d planedajn mondojn, nefleksebla volo al la servo de la Scienco, gajnis ducent pesetojn monate ĝis la 19-a de julio! Li bezonis sin helpi per artikoloj en la gazetaro, en la sciencaj revouj el Anglio, el Francio k el Ameriko, kolektante, je la kosto de multpena laboro, modestan salajron de specialiĝinta laboristo. Kiom da doloro k kiom da honto! K pensi ke iu ajn burokrato de iu ajn ŝtatoficejo, ke la ulo metita en iu alta posteno, dank'al flatado. gajnis rapide salajron de pli ol ses mil pesetoj monate!

Estis CENU. (Komitato pri Nova Unugita Lernejo) kiu atingis por Komas Sola monatan stipendion de mil

Eldonkvanto 3200



# NEKROLOGO

ILES perdis por ĉiam unu el siaj fervoraj membroj. ILES perdis kamaradon Jozefo Garganta. En pala aŭtuna tago, kiam la sunradioj kribriĝas tra la arĝentaj folioj de la arboj, kiam tie ĉe la fronto kanonoj tondregadas kvazaŭ fulmo k mitraliloj klakadas, la morto ŝteleniris en la malriĉulan dometon k forprenis, k forprenis por ĉiam nian kamaradon.

K-do Jozefo Garganta senrezerve k abnegacie disponigis siajn kapablojn k siajn konojn, fidele gardostarante ĉe Informa Bulteno de ĝies komenciĝo.

Per radiostacio de C. N. T. k F. A. I. li atingebligadis la batalojn k la aspirojn de la hispaniaj laboristoj al pli da bonstato k libero, memspertinte de infanaĝo multfoje la skurĝojn de mizero k nehavo k la frapojn de la reakcio.

Funebras ILES pro la grava perdo en gravaj momentoj. Pro la perdo de sia ano k-do Jozefo Garganta.

K-do, Garganta, tro frue k tre juna la morto forfalĉis cian vivon. Ni, kiuj kunagadis kun ci k kiuj restas ankoraŭ vivaj, konservos en la tresorejo de nia koro proleta, la belajn memorojn, kiujn ci postlasis, daŭrigonte abnegacie la batalon pro justo k libero.

**ILES**

pesetoj, kiujn li enspezis dum tiuj lastaj monatoj de sia vivo. Minimuma kompenso, kiun la Revolucio ŝuldis al la sciencisto-homo, kiu per la kapabligo kultura de la amaso, estis helpanta dum longaj jaroj, ke tiu efektiviĝu.

Tion ni scias hodiaŭ. Kiel ni scias kvanton da detaloj emociigaj de tiu vivo pura k simpla. Konstantemaj homoj, sin liverontaj al la tasko, iom post iom eltrovos Komas Sola'n, per biografioj k per verkokompiladoj, kiuj lin montros al ni kiel li estis k kiel lia konscio tion ne volis aperigi dumvive. Ĉiam la sama fakto! Ĉiam la elstaraj homoj vualitaj per silento, per la kovrilo de malklaraj destinoj, ĝis la morto ĉion rivelas! Ho ve! La gloro daŭras esti posedaĵo de falsuloj, de grandaj ĉarlatanoj, kiuj en la vivo -foiro scias vendi bonpreze siajn produktojn. La silentuloj, tiuj kiuj estas modestaj, humilaj, scienco- laboristoj, la arkitektoj de nova mondo, vivas k mortas en la grandioza anonimeco, el kiu —tragika satiro— nur la morto ilin eligas.

Bona Komas Sola, sciencisto de la popolo k por la popolo! Barcelona akompanis viajn restojn pie k elkore profunde! Premio al via silenta vivo, de konstantaj neripozoj, de senhalta laborado, de pasio por la bono k la kulturo!

Sur la festonoj kiuj kovras viajn restojn, kiuj akompanis vian lastan solecan promenon, mi liveras tiujn miajn florojn, elplumigitajn akorde kun la muziko de via enterigo k kun la unusona paŝado de la popolo, kiu per fermita vicaro, paradis en silento, kun angoro antaŭ viaj sengravaj restaĵoj de homo bruliĝinta k amatiĝinta de la plej postulema k elĉerpiga el la amoj: la amo al la Scienco, al kiu vi servis lojale k sindonege.

**Tradukis: "El Solidaridad Obrera", Osbanto**

**Atentu pri nia nova adreso: Informa Bulteno**
**av. Durruti, 30 - Barcelono**

## FIEGAJ SANKTAJOJ

**K mi trovas, ke pli malbona ol la morto estas la virino, kiu estas kaptilo k kies koro estas reto k kies manoj estas katenoj, tiu kiu plaĉas al Dio, sin savos de ŝi, sed pekulo estos kaptita de ŝi.**

**Pred. 7: 26**

**Jen kion ankoraŭ serĉis mia animo k ne trovis: viron unu inter mil mi trovis, sed virinon inter ĉiuj mi tute ne trovis.**

**Pred. 7: 28**

**Fiegaj sanktaĵoj! Ĉu la viro estas pli morala, pli bona ol la virino? Ĉiu povas trovi, ke tute ne!**

**Sur ĉiu paĝo de la fisankta Krudlibro oni povas trovi tiajn senmoralajn pensojn pri la virino. Kompatinda virino. Sed al vi amon!**

**Klas Karlsson**

### *PETO AL LA KONGRESO DE A.I.T.*

***La germanaj antifaŝistoj, kiuj venis al Hispanio komence de la revolucio por luktadi kontraŭ la faŝismo, k kiuj poste estis enkarcerigitaj, direktis la sekvantan peton al la kongreso de A.I.T., kiu okazis en Parizo en la komenco de Decembro.***

***Saluton, kamaradoj.***

***Ni germanaj anarkosindikatistoj, enkarcerigitaj en la antifaŝista Hispanio vin salutas frate, ni bondeziras k atendas de la kongreso fruktodonan laboron por la disvolviĝo de nia movado k de la hispania revolucio.***

***Kamaradoj, ni petas al vi helpon. Pli ol 5 monatojn ni estas enkarcerigitaj de G. P. U. protektata de oficiala ŝtatinstitucio, "Speciala Departemento pri la Ŝtatinformado", kies ĉefo estas Ordunjer.***

***En la okazo de niaj ekzamenoj oni akuzis nin pri plej fantaziaj krimoj, akuzoj, kiuj post la fino de la ekzamenoj, estis flankenlasitaj. Oni volis ekkoni i. a. la adresojn de kamaradoj, kiuj rezidas ankoraŭ en Germanio.***

***Ni protestis dudoje per malsatstriko kontraŭ nia reteno. Pli ol du fojojn oni promesis al ni la liberon, sed ĉiam venkis G. P. U.***

***Kamaradoj, hodiaŭ ni estas lacigitaj k eĉ malsanaj. Niaj vivkondiĉoj estas malbonegaj. Ni komprenas por C. N. T. estas malfacilege atingi nian liberigon, pro la cirkonstancoj, kiujn travivas la hispana movado.***

***Kamaradoj de la kongreso de A.I.T., organizu internacian proteston favore al nia liberiĝo tuja.***

***Tion ni petas al vi.***

***Vivu A. I. T.! Vivu la internacia solidaro! Vivu la hispania revolucio!***

## La kolektivigita mastrumejo en Gramanet del Besos

Ĝis 19 de Julio 1936 Gramanet del Besos estis konsiderata kiel kvartalo de Barcelono, en la sindikataj efektoj, sed la venko de la liberiga movado permesis al C. N. T. interveni en la municipan vivon ĝian k ekde tiam la laboristoj de Gramanet del Besos realigis tion al kio ili delonge sopiris: La sindikata aŭtonomio.

Ekde tiam la kvartalaj komisionoj konvertiĝis en Sindikatojn k inter ili fondiĝis la Loka Federacio de la Sindikatoj, aliĝintaj al C. N. T.

Post la atingo k starigo de la sindikata aŭtonomio, la kamparanoj atingis la sian.

La kamparanoj, kiuj laboris en la tiel nomata grupo "Sanchis" fondis la unuan agrikulturan kolektivigitan mastrumejon. La 30an de Decembro 1936 al ĝi aliĝis la centraj kamplaboristoj de Besos. Kie ili daŭre kunlaboris korece kun la Kolektivo de la Kamparanoj de Barcelono.

La kolektivigita agrikultura mastrumejo de Gramanet del Besos funkcias kun kompleta sendependo ekde Aŭgusto 1937, konsistigita el la tero de la dirita grupo "Sanchis" k la cetero el la tero kolektivigita de Gramanet del Besos.

La Agrikultura Kolektivigita Mastrumejo de Gramanet del Besos ne havas grandan gravecon el materiala vidpunkto. Ĝia tero ja estas ioma.

En la kolektivigita mastrumejo laboras 63 homoj k 40 virinoj, kiuj produktas artiklojn por 15.000 pesetoj semajne.

Sed antaŭ tio, se materiale ĝi estas malgranda, en la aspekto pri la interna k socia orientiĝo, ĝi superas ĉiujn kolektivigitajn mastrumejojn.

La kolektivigistoj de Gramanet del Besos enspezas 100 pesetojn semajne. La virinoj -59 pesetojn. Krome la kolektivigita mastrumejo asekuris la kuracistan helpon por ĉiuj malsanoj. La malsananta enspezas sian tagsalajron, kvankam ne laboras.

Kiel detalo pri vivo prospera k bone orientita, ni povas montri la kazon pir la kamarado Pedro Barte, kiu estas kontenta pro tio ke estis la unua jubileito de la Kolektivigita Mastrumejo kun 60 pesetoj semajna salajro.

La produktaĵoj de la kolektivo estas vendataj ĉiutage sur 3 stabloj en la vendoplaco en Barcelono k en la loka vendejo. La tri stabloj estas priservataj de virinoj apartenantaj al la Kolektivo.

Al la Kolektivo apartenas ankaŭ, kun la samaj devoj k rajtoj, unu masonisto k ĉarpentisto.

La ekonomia rezulto dum la 3 monatoj de sendependa funkciado estas tute kontentiga. Krom la 40.000 pesetoj, kiuj estas uzitaj pri la plibonigo de la kolektivigita mastrumejo, en la kaso troviĝas 42.000 pesetoj. K ĉi-ĉio dum tri monatoj!

Aktuale oni projektas, rigarde al baldaŭa realigo, puton por akvumi la tutan kultureblan zonon, kondiĉo kiu pliigos konsiderinde ties produktkapablon.

La Kolektivigita Mastrumejo apartenas al la Loka Kamparana Sindikato k kiel tia al la Loka Federacio de la Sindikatoj de C. N. T.

Ĝi intervenas ankaŭ en la aktivecoj de la Agrikultura Sindikato k en la Municipa Agrara Komitato.

La Administra Konsilantaro de la Kolektivo estas konsistigata el 5 kamaradoj. Krome estas unu delegato k unu subdelegato en ĉiu zono.

La Administra Konsilantaro k la teknikaj delegatoj, en koreĉa k kunpenetra kunlaboro, estas kondukantoj la kolektivigitan mastrumejon de Gramanet del Besos al plena sukceso.

**LETERO EL ARAGON**

## La teroro en Aragon daŭras

La teroro, kiun suferas la Aragona loĝantaro, de certa tempo, ankoraŭ ne ĉesos ĝis la Komunista Partio ne estas neniigita de la popolo.

Laŭ la partio, kiu "direktas" la destinojn de Aragon ekde la forigo de la Konsilantaro, ĉio marŝas sur bona vojo, volante diri, ke antaŭe okazis malfeliĉoj k en la frontoj oni ne entreprenis bataloperaciojn. Eble hodiaŭ oni manĝas pli k vivas pli trankvile ol antaŭe? La Aragona popolo baldaŭ diros sian parolon.

Oni devas labori k klopodi por la milito, diras la gazetoj de la Komunista Partio de Aragon. Ni jam vidas, ke ili agas en tiu senco. Ili propagandas laboron por la milito k ne faras pli ol semadi malkonkordon inter la kamparanoj por detrui la kolektivigitajn mastrumejojn, kiuj estas la unika garantio por la laboro k la produktado. Unue ili enkarcerigas tiujn, kiuj per siaj manoj kalaj povus pliigi la produktadon k plifortifiki la ekonomion.

Se oni daŭrigos tiujn procedojn, oni ne povos detrui la komunan malamikon. La malliberigitaj nur pro la kaprico de iu partio, ne povas plu resti en la karcero. La kampo bezonas ilin, la tero bezonas ties manojn k la konscienco de tiuj kapricaj partioj devas hontiĝi retenante homojn sen iu ajn delikto.

Ni volus paroli klare. Ni ja promesis gajni la militon, sed maleblas silenti dum estas uloj kiuj profitas nian silenton.

Ni forrabis nenion, sed la kolektivigitaj mastrumejoj de Aragon postulos de tiu partio la pesetojn forŝtelitajn el ties kasoj, la sapo k amaso da objektoj. Kie estas se ne en viaj poŝoj? La Liberecana Junularo petos de vi la skribmaŝinojn, la pesetojn destinitajn por la klerigo de la junularo, la dispecigitajn librojn, la cindrigitajn flagojn, la fotografaĵojn de Ascaso, kiuj estis surstrate piedpremitaj, certe de homoj sen cerbo k finfine la liberon de la plej bonaj batalantoj siaj k veraj antifaŝistoj, kiujn oni enkarcerigis por komplezi al la perfiduloj, kiuj libere, sen ĝene vagas tra la stratoj.

Ĉi ĉion oni petos al vi, "kamaradoj komunistoj". Poste vi povas aserti: "Ni forrabis nenion." La prudenteco de la homoj de C. N. T. k F. A. I. estis ekzempla dum oni nomis ilin "nekontrolitaj, tribanoj, friponoj", por eviti kian ajn malgrablaĵojn. Oni alnomis nin per tiaj epitetoj por senprestiĝigi nian laboron kolektivigan k samtempe volas altrudi sin per teroro.

Sendube ĉiuj partioj, kiuj ne havas revolucian ekzemplecon k ne disponas pri la simpatioj de la popolo, vidas sin devigataj agi per la teroro, kiu estigos al ili rondan frakason.

La teroro estas armilo de ĉiu faŝista bando, pro tio ili promenas tra la vilaĝoj de Aragon honore kiel la stulta Napoleon tra la Eŭropaj urboj. Nin ne devas strangi la fakto, ke kiam ili pasas tra la stratoj la maljunaj katolikinoj k la ĉiamaj reakciuloj ekkrias: Dankon al

# Cinika Esperantisto

Laŭ ĝenerala opinio publika, la esperantistoj estas homoj bonmoraj. Oni ne darfas pensi pri ĉeesto de senhontaj, cinikaj esperantistoj. La motivo pri tia konsidero ne interesas nin. Por ni gravas la mema fakto. K ĝin ni konstatas. Sed bedaŭrinde k hontinde kelkiam ellarviĝas esperantisto kun eble denaska aŭ atavisma cinikemo. Kun senbrida cinikemo. Konkrete, temas pri V. Bosk, la subkorifeo de la supermoderna movado —Popolfronta Esperantismo— k satelito de Hernandez. Grandanime tiu subtrubaduro abortis en la Novembra numero de **Sennacieca Revuo** "studon" pri la hispana situacio. Por patenti publike sian senpartiecan partiecon aŭ sian partiecan senpartiecon. K sian atavisman cinikemon.

Ni metu la pristudendan "studon" de la elstara popolfronta bardo sur la operacia stablo, prenu la kirurgian lanceton k analizu ĝin.

Evidente, la informaro de **Sennacieca Revuo** pri la Majaj okazintaĵoj inflamis la verkemon (cinikemon) de B. Cetere, ĝin konfesas li mem, prologante:

"Pro troa modesto aŭ pro eksceso da paveco, la aŭtobiografioj estas, plej ofte, malperfektaj."

Diable! K grandaj verkistoj, kiel ekz. Ruso, Pestaloci, Tolstoj, ne konis tiun akciomon literaturan k verkis ampleksajn aŭtobiografiojn. Kompatinduloj! Ili ne antaŭvidis la naskiĝon de superliteraturisto, kiu neos elfunde la valoron de a aŭtoiolbgrafio kiel literatura speco.

Li trovas la informaron kiel aŭtobiografio de la organizoj C. N. T. k F. A. I. "Kompreneble ĝi ne estas escepto en la regulo". K ni, logike, supozas, ke jen la fama trubaduro elmontros la tutan malperfektecon, refutante per nerefuteblaj refutiloj refutendaĵojn, mensogojn, kalumniojn, kiuj formas la malperfektan fizionomion de la aŭtobiografio pri la organizoj C. N. T. k F. A. I. Tamen la modestulo surprizas nin per liliputa elturniĝemo:

"Ne estas mia celo refuti konkretajn punktojn, nur fari ĝeneralajn konsiderojn."

Pro kio popolfrontano ne "celas refuti konkretajn punktojn", sed "nur fari ĝeneralajn konsiderojn"? Se la "aŭtobiografio pri la organizoj C. N. T. k F. A. I. estas malperfekta, pro kio li ne montras la memajn malperfektaĵojn"? K preferas infinitive ciniki?

"Ĉiuj interpuŝiĝoj, ĉiuj baraktoj, ĉiuj kvereloj en Hispanio inter la diversnuancaj faktoroj de la Antifaŝismo, havis ĉiam la saman profundan kaŭzon, nome la obstina pretendo de la anarkistoj ekde la komenco gvidi ekskluzive la Revolucion laŭ siaj doktrinecaj principoj k atingi la absolutan mastrumadon de la lando."

Ĉu envere "la obstina pretendo de la anarkistoj ekde la komenco gvidi ekskluzive la Revolucion laŭ siaj doktrinecaj principoj estas la profunda kaŭzo de ĉiuj interpuŝiĝoj ktp. en Hispanio inter la diversnuancaj faktoroj de la Antifaŝismo"?

Ke la anarkistoj ne pretendis obstine "ekde la komenco gvidi ekskluzive la Revolucion" pruvas la fakto, ke en la registaro de L. Kabaljero partoprenis ne nur la Anarkismo, sed preskaŭ ĉiuj antifaŝistaj sektoroj, kvankam efektive la plejparto el ili havas nekonsiderindan malplimulton, kiel ekz. la Komunista Partio. La anarkistoj grandanime allasij al ĉiuj organizoj, malgraŭ ilies nekonsiderindeco, partopreni en la mastrumado de la lando, ĉar ili profunde konsciis, ke nur la unueco de ĉiuj antifaŝistaj organizoj, de ĉiuj senescepte, garantios la venkon super la faŝismo.

Aliparte ĉiuj organizoj havis siajn militunuojn, kiuj ĉe la pluraj batalfrontoj agadis memstare. Tiel ekz. la Komunista Partio havis sian kolonon **Karlo Marks.** Tial restas tute senbaza k tendenca la aserto de Bosk pri "obstina pretendo de la anarkistoj ekde la komenco gvidi ekskluzive la revolucion", kiel la sama profunda kaŭzo por ĉiuj interpuŝiĝoj, ĉiuj kvereloj en Hispanio inter la diversnuancaj faktoroj de la Antifaŝismo". Espereble la popolfronta ĵonglisto suferas pro partieca amnezio, kiu forgesigas al li faktojn, kiujn ni volas rememorigi al li.

Evidente Bosk forgesas, ke Komorera partoprenis en Bruselo en la komploto de la katalunaj naciistoj Ljui, Valjeska, Ventura Gassol k.a. kontraŭ la anarkistoj por uzurpi la mastrumadon de Katalunio. Evidente li forgesas, ke la komunista ministro Uribe proponis rigorajn mezurojn kontraŭ la pure proleta k antifaŝista organizo P.O.U.M. Du fiagoj, kiuj disrompis la antifaŝistan blokon k estigis nekvietigeblan malkonkordon en la tendaro de la Antifaŝismo. K laste, li forgesas grandanime la pereskutojn k la teroron, kiujn entreprenis la Komunista Partio kontraŭ la homoj de C. N. T. k F. A. I., persekutoj k teroro, antaŭ kiuj abomenis la tuta mondo.

Kaŝante sian partiecan apartenecon Bosk cinikas!

"Ili sisteme ignoris la ekziston de aliaj proleto-organizoj, ili ankaŭ ignoris multe pli firme la aktivan kontraŭfaŝismon de la etburĝaj maldekstrulaj fortoj, ili malatentis la eksterajn cirkonstancojn, kvazaŭ iu ajn regiono de la mondo nuntempe povus funkcii sendepende de la ceteraj, ili malkonis la spiriton de la popolo, kiun ili nepre volis "savi" bonintence, sed erare (k por tiu rolo ili sin kredis kiel "elektitoj de Dio")."

Unue: la anarkistoj ne ignoris la ekziston de aliaj prolet-organizoj. En la registaro havis reprezentantojn ĉiuj prolet-organizoj. C. N. T. k F. A. I. kondutis tolereme al ĉiuj senescepte. Ili ne proponis kiel ekz. faris la komunista ministro Uribe, rigorajn persekutojn kontraŭ alia prolet-organizo. Ili ne persekutis, nek enkarcerigis komunistojn, kiel hodiaŭ faras la lastaj.

---

Dio, ke jan venis la niaj! Trankviliĝas ilies animoj k pensas remalfermi baldaŭ la preĝejojn.

La kontraŭrevolucio estas fakto. La komunistoj malvolvas siajn furorojn k oni ne scias kien alvenos, tamen ni scias unu aferon, ke ili fiaskos antaŭ la popola opinio. Ilies propagando neniam penetros en la cerbon de la kamparanoj, sed ilies ekzemploj de cinikaj hundoj lasos aspran rememoron ĉe ĉiuj anguloj de la vilaĝoj de Aragon.

La planoj de la Komunista Partio estas starigi aŭtoritatecan k privilegiecan reĝimon. Tion ni scias. Ĝin scias eĉ la katoj. Kie paŝas, ili odoras je militarismo aŭtoritatismo k sklaveco.

Ni laboristoj ne devas permesi la stariĝon de diktaturo, ruĝa aŭ nigra.

Ni volas fari la revolucion k gajni la militon por plasmigi socion liberan k bonstatan.

Malsupren la diktaturojn!

Vivu la Socia Revolucio!

*La 19 an de Desembro. Alcañiz.* RAMON

Due: la anarkistoj tute ne ignoris la aktivan kontraŭ-faŝismon de la etburĝaj maldekstrulaj fortoj. C. N. T. k F. A. I. priatentis la interesojn de la etburĝaro. De tiu etburĝaro, kiu nuntempe ekspluatas la proletojn pli kruele ol la grandburĝaro, plialtigante laŭvole la prezojn de la produktoj. Por altiri la etburĝaron al komuna luktado kontraŭ la faŝismo C. N. T. k F. A. I. direktis specialan manifeston al la sama. Tiu manifesto estis publikigita en la 9 n-ro de "Informa Bulteno" (de 28 de Aŭgisto 1936). Ĝia unua paragrafo tekstas: "Estas nekomprenebla tiu timo, kiun la etburĝaro sentas pri ni. Estas logike, ke la milionuloj, la plutokratoj k la grandposedantoj timas nin, ĉar ili representas la privilegiojn, t. e. la maljustecon. Sed la etburĝoj, modestaj komercistoj k industriistoj, devas kompreni, ke ni estas malamikoj nur al tiuj, kiuj, eksploatante la laboron de aliaj, amasigis riĉaĵojn, kiuj apartenas al la produktistaj, al la laboristoj." La dua paragrafo tekstas: "Ni estas plene konvinkitaj, ke en la radaro de la nova sociordo, kiu formiĝas tiu etburĝaro konsistigos gravegan parton de la nova mekanismo, kiun la laborista klaso trafe muntas en la sama horo, en kiu la burĝaro okazigis la 19an de Julio 1936."

Trie: la anarkistoj ne malatentis la eksterajn cirkonstancojn. Por venki la faŝismon k efektivigi la revolucion ili fidis al la internacia proletaro, al la solidaro, al la aktiva solidaro de la internacia proletaro, al kiu ili direktis plurajn manifestojn. Ili profunde konsciis, ke la liberiĝo de la laborista klaso devas estis afero de la laboristoj mem. Ili ne atendis helpon de la ŝtatoj k la registaroj, tiom malpli de la t. n. demokrataj, kiuj ne estas pli malgrandaj malamikoj al la revolucio.

Kvare: Neniam la anarkistoj "kredis sin kiel elektitoj de Dio", kiun ili laŭideologie k laŭdoktrine malagnoskas.

Pro tio Bosk cinikas!

"En la menso de plimulto da anarkistoj la milito staris en dua vico k la revolucio estis plej urĝa tasko."

La anarkistoj konsideris k plu konsideras la militon k la revolucion nedisigeblaj. La batalo kontraŭ faŝismo estas revolucia milito. Ili, luktante kontraŭ la faŝismo, konstruas la novan sociordon pli justan, kiu nome pravigas la revolucian militon. Ili ne preferis, kiel faris la komunistoj, gajni la militon, perdigante al la proletaro la atingaĵojn farante punindajn koncesiojn antaŭ anglaj k alilandaj eksploatistoj, kies interesoj estis grave minacataj en Hispanio pro la revoluciaj ekagoj-kolektivigoj k sociigoj.

Bosk cinikas!

"La popolo (la laboranta k suferanta popolo ne cerbpremata de "tutecaj" teorioj) spertis baldaŭ la fruktojn de "liberecana" socio k ne unuanime ŝatis la anarkistajn realigojn. Speciale la vilaĝanoj (kamparanoj) subpremataj k perfortataj en la nomo de la liberiga idealo, reŝistis pasive unue k poste opoziciis per aktiva protesto tiujn partiecajn provojn, kiuj tute ne feliĉigis ilin. Ili rifuzis kun malsimpatio tiujn realigojn kiel trompojn."

Pro kio Bosk ne pruvas konkrete: kiajn "fruktojn spertis baldaŭ la popolo de "liberecana" socio"? Kiuj "kamparanoj estis subpremataj k perfortataj en la nome de la liberiga idealo"? Per kia "aktiva protesto ili opoziciis tiujn partiecajn provojn"? Per kia ekstera esprimo ili rifuzis kun malsimpatio tiujn realigojn kiel trompojn"? K krome: ĉu la anarkistoj trompis la kamparanojn, eksproprigínte la teron de la grandaj terposedantoj k farinte ĝin komuna posedaĵo, aŭ la komunistoj, kiuj nun re-propriigas la teron al la posedintoj, motivante ke nun ne estas kondiĉoj por kolektivigoj? Pro kio Bosk demagoge cinikas?

Post ŝablona difino pri la malfeliĉmemora Popola Fronto li mistifikas: pri "Malakordo inter "la anarkistaj amasoj" k "siaj ministroj" k konkludas:

"Tiu ĉi nekontestebla fakto rezultigis oftajn k seriozajn konfliktojn, kies kulmino montriĝis per la pseŭda "revolucio" de Majo en Barcelono. Aliaj malklaraj elementoj miksiĝis, kun la celo deturni ilin je la profito de la faŝistoj."

Bravisime!, provoso Bosk. La anarkistaj amasoj delegis reprezentantojn al la registaro k poste konfliktis kun ili: Ili eĉ faris "la pseŭdo-revolucion" de Majo en Barcelono"! Temo pri tragikomedio. K en ĝi vi Bosk kiel ĉefrolulo, t. e. pajaco. Sed kion diros pri tio la komunisto Rodrigues Salaz, kiu akorde kun la komunista ministro Ajguade, atakis per centoj da gvardianoj la telefoncentrejon en Barcelono, okazigante tiele la incidentojn?

K "aliaj malklaraj elementoj"! Certe "aliajn malklarajn elementojn" Bosk konas klare. Ili ja "miksiĝis aktive en tiuj incidentoj, kun la celo deturni ilin je la profito de la faŝistoj".

"Estas tiu ekstremeca, blindiga doktrinemo, kiu malhelpis longe la anarkistojn akcepti la Popolarmeon, la unuunuran komandon, la disciplinon (oni eĉ propagandis preslitere per afiŝoj por la organizo de la maldisciplino!) k ĉiujn trafajn k ĝustajn devizojn."

Kia spekulativa filozofio! Kia cinikeco!

Fakte estas la anarkistoj mem, kiuj pledis en la gazetaro k mitingoj pri Popolarmeo, pri unuunura komando, sed pri Popolarmeo, kies tasko estos la efektivigo de la revolucio, k pri unuunura komando, kiu direktados kompetente k trafe la bataloperaciojn, ne pri Popolarmeo k unuunura komando, kiuj estos uzurpataj de iu partio, je kies profito oni pretendas disponigi ilin.

La anarkistoj ĉiam propagandis kontraŭ la disciplino, kontraŭ tiu disciplino, kiu faras el la homo aŭtomato k pupo, la anarkistoj propagandis kontraŭ la disciplino akcentante la aŭtodisciplinon. Tiasence, Bosk, la anarkistoj "eĉ propagandis preslitere per afisoj por la organizo de la maldisciplino"! La unua milicanarkolono, tiu de Durruti, distingiĝis per sia ŝtala disciplino, per sia aŭtodisciplino. Tiun fakton konfesis la homoj de Durruti, liaj samkolonanoj. Se estas tiel, do pro kio, Bosk, cinikado pri "maldisciplino"?

"Frapoj k batoj instruas la homojn."

Jes, jes, mentoro Bosk. "Frapoj k batoj instruas la homojn." Pri tio atestas formalaperintaj kamaradoj niaj, inter kiuj Berneri, k aliaj kiuj plenigas aktuale la karcerojn de la popolfronta Hispanio.

"La atmosfero pli k pli iĝis densa k la malkontento k la malkonsento fine krevis..."

Certe la popolfronta fileto aludas pri la majaj incidentoj. Sed li, konstateble, elcurbumis, ke jam li atribuis tiujn incidentojn al "seriozaj konfliktoj" inter "la anarkistaj amasoj", "siaj ministroj" k "la respondeculoj de la koncernaj organizoj". Bosk ne bone ludas sian rolon. Ĉiuokaze ni konas la "malkontenton" k la "malkonsenton" de Komorera, Gasol, k.a. Ties "malkonten-

NIAJ ABONANTOJ POVAS PAGI SIAN LAUVOLAN ABONKOTIZON AL LA JENAJ NIAJ PERANTOJ:

| K-dino A. BOIS | K-do Adr. PERSSON | K-do T. C. KLIJN |
|---|---|---|
| á MECÉ par VITRÉ | STADSHAGEN 13 - A | DAPPERSTR 123 - huis |
| (ILLE-et-VILAINE) FRANCIO | STOKHOLMO, SVEDIO | AMSTERDAMO, NEDERLANDO |
| Francoj, ne forgesu vialandan kotizejon! | Svedoj, kotizu al privialanda peranto | Nederlandanoj pagu lauvolan abonprezon al nia amsterdama peranto |

La kotizontoj el la ceteraj landoj povas sendi sian kotizon k monhelpon al nia k-dino A. BOIS k k-do Adr. PERSSON kiuj estas niaj internaciaj geperantoj.

Anstataŭ sendi al ni responkuponojn, kotizu do rekte al niaj geperantoj.

La hispanaj abonpagontoj estas petataj sendi la monon rekte al ni per posta giro. Adreso por ili: «INFORMA BULTENO», Esperanto-fako, av. Durruti 30, Barcelono.

# Ekonomiaj Organoj

Hispanio, post 15 monatoj krude batalante kontraŭ siaj malamikoj enlandaj k eksterlandaj, ankoraŭ ne trafis enartikigi la neprajn organojn por direkti sian ekonomion. Tamen tiun problemon, kiu gravas samkiel tiu pri la milito, oni devis starigi de la unuaj momentoj, kiam komenciĝis la batalo. La tradicia manko de antaŭvideco k de ordiga senco estas ankoraŭ, post la venko de Julio 1936, mortiga pezo de kiu ni devas liberigi nin nepre. La produktado estas bezona aldono al la aktiveco de la frontoj. Kiam lando, kontraŭ kiu batalas unuagradaj potencoj, estas senigata de ekstera helpo pro krimінala politiko, kiu kreas asfiksian atmosferon, nepre devas serĉi en si mem la kielon levi sian laborkapablon al la plej altaj limoj de la produktado. La stabilo de ĝiaj frontoj dependas de la stabilo de ĝia postfronto organizita por servi kiel militarsenalo k liveradi la bezonajn nutrajojn.

La laboristoj, apartigitaj el la influo de la politiko kun siaj tradiciaj kadukeco k disipemo, estis la unuaj, kiuj komprenis la gravecon de la momento, en kiu oni komencigis la novan civilizacian epokon. Problemoj, tiom simplaj k fundamentaj, kiel tiu pri la enartikigo de la produktado pere de la konsilantaroj pri la Industrio k la Ekonomio restis neperceptitaj aŭ oni ne volis prikonsideri ties veran gravecon. C. N. T. alvokis per ĉiuj siaj fortoj la atenton de la ceteraj sektoroj super tiu aspekto de la ekonomia problemo en Septembro 1936, k ekde tiam ĝi pledas por ĝi, ĉar la rekono de tiu neceso kuŝas en la cerbo de ĉiuj antifaŝistoj k de la registaro mem.

Oni konstatas la paradoksan kazon, ke la plej obstinaj kontraŭstarantoj al la Sindikatoj, kiuj denuncas ilin kiel fontojn de obstakloj por la vigla elvolviĝo de nia fabrika k agrara potenco, estas nome la samaj, kiuj malebligis ĝis nun, kun sistemaj repuŝoj al la plej bonaj iniciativoj, la enartikigon de la centrigaj k direktantaj organoj de la hispana ekonomio. Parte de C. N. T., delonge la Konsilantaroj pri la Ekonomio k la Industrio estis fondotaj. Multaj el la difektoj, kiujn rezultas la manko de racia plano pri la ekspluatado de niaj riĉaĵoj, kiu procedus al la pliĝustigo de la produktado, estus tute rektifitaj. Oni do devas alpaŝi al la starigo de tiuj organismoj, forlasante ĉiujn obstaklojn, kiuj nur produktas simplajn prokrastigojn en la solvo de problemo tiom grava. La ŝtato k la Sindikatoj devas atingi al decido, kiu ŝtopos tiun malplenon rilate al niaj bezonoj.

En Katalunio, kie la influo de C. N. T. estas potenca k kie niaj homoj direktadis la ekonomion, oni baldaŭ konstatis la rezultojn. La unua mezuro de la Generalitato ĉe la ekpartopreno de C. N. T., estis leĝigi la atingâjojn de la proletaro tra la dekreto pri la konfiskoj k kolektivigoj. Post tiu mezuro sekvis alia de konstrua karaktero, nepre komplemento al la unua: la fondo de la Supera Ekonomia Konsilantaro kun reprezentantoj oficialaj k sindikataj de ĉiuj industrioj. Tiele estis atingebla la solvo de problemoj de produkta karaktero, anstataŭ prokrastigi ilin. Se tiam Hispanio estus kompreninta la aŭtonoman regionon, starigante veran solidaron de la fortoj, la situacio estus sufiĉe malsama. Katalunio estus antaŭenirinta pli malproksimen en la disvolviĝo de sia ekonomia potenco.

Kio urĝegas, kio ne prokrastendas el tagon, estas la starigo de la regantaj organoj por la agrikultura k industria elvolviĝo, en kiuj estos reprezentataj la faktoroj de la produktado: la Sindikatoj.

**Trad.: B. QUERALT**

---

to k malkonsento" krevis, sed kie restis la "malklaraj elementoj"?

La popolfronta apologisto fermas sian glosadon per la didakta sentenco: "En ĉiuj vojoj de la vivo, en la vojo por la homa liberiĝo, la revoj ja flugas pli alten k pli rapide ol la homo povas marŝi tra la irejo al la utopia plenfeliĉo. Se la hispanaj anarkistoj estus pensintaj tiel dekomence, Hispanio estus ŝparinta al si serion da malsukcesoj k multe da nenecesa doloro.".

Kia reakcia mensemo!

Nei la aspiron al "la homa liberigo" k pli justa socio signifas nei ĉian evoluon, socian k ekonomian. Sed por fari tion necesas posedi partiecan blindecon, virtuaze kaŝitan, k denaskan cinikemon. Ĉu ne, Bosk?

"Se la hispanaj anarkistoj estus pensintaj tiel dekomence", kiel pensas Bosk, "Hispanio estus ŝparinta al si serion da malsukcesoj k multe da necesa laboro", k Franko delonge estus regonta la Popolfronta Hispanion.

Laŭ ĝenerala opinio publika, la esperantistoj estas homoj bonmoraj. Oni ne darfas pensi pri ĉeesto de senhontaj, cinikaj esperantistoj. La motivo pri tia konsidero ne interesas nin. Por ni gravas la mema fakto. K ĝin ni konstatas. Sed bedaŭrinde k hontinde kelkiam ellarviĝas esperantisto kun, eble, denaska k atavisma cinikemo. Kun senbrida cinikemo. Konkrete, temas pri V. Bosk, la subkorifeo de la supermoderna movado —Popolfronta Esperantismo, k satelito de Hernandez, ĉefredaktoro de Popola Fronto, kiu nelonge nomis la enkarcerigitajn antifaŝistojn "friponoj".

**PARIO**

# KRONIKO

"La Dépêche" de Toulouse (6.12.) publikigas deklaron de J. Diaz, P.S.U.K.-gvidanto. Parto el deklaro tekstas: "Ni daŭrigas la linion de kunlaborado ĉiufoje pli intima kun la anarkistoj."

Jes, jes, ni kredas tiajn "sincerajn" deklarojn. Aparte kiam ili estas elbuŝigataj de Komorera aŭ lia satelito J. Diaŝ.

* * *

La angla laborista gvidanto Attlee, vizitante Madridon, estis intervjuita de redaktoro de "Kastilja Libre". Al la demando, ĉu C. N. T. estas konata en Anglio, li respondis:

"C. N. T. estas konata en mia lando. Estas certa konfuzo pri la agado de tiu popola forto, sed de proksime oni konstatas, ke C. N. T. en Hispanio posedas grandegan avantaĝon; ĝi luktadas kiel popola fronto por la popola afero kiel ties misio."

* * *

Responde al demando de deputado, la prezidanto de la franca Gabinedo deklaris, ke la entuta kvanto de la fero eksportita al Germanio estis 500.134.452 kgr. por la periodo inter la de Julio k 31 de Decembro de 1935. La sama estis 600.194.313 kgr. por 1936 k 500.692.570 kgr. por la unuaj 8 monatoj de 1937.

Popolfronta Francio armigas per liverado de fero la faŝistan Germanion!

* * *

"La Revolution Proletarienne", revuo aperanta en Parizo, en sia lasta numero skribas:

"La plejparto el la legantoj konas sendube la nomon Kart Landau, aŭstra kamarado, komunisto de la opozicio, kiu post la frakaso de Vieno rifuĝis en Francio k publikigis sub la pseŭdonimo Bertran Wolf broŝuron pri la civila milito en Aŭstrio.

En la komenciĝo de la Hispana milito Landau venis al Barcelono por disponigi sin al P. O. U. M. Hodiaŭ, kiel tiom aliaj... malaperis. La uloj de G. P. U. maskitaj oficiale de la hispana polico, iris sub preteksto reteni lin, forpreni el la malgranda domo situata en la periferio de Barcelono, kie li loĝis. Ekde tiam ne estas trovebla komuniko pri ii. La oficiala polico neas lian retenon k G. P. U. sekvas esti tiel trankvila.

Lia kunanino, kiu estis enkarcerigita ekde Junio samtempe kun Nin, Gorkin ,ktp. k kiu ekde tiam ne estas akzamenita nek kulpigita pri kio ajn, decidis deklari malsatskrikon.

Jen ĉi tie la letero, kiun ŝi direktis al la Ministro pri la Interna Afero de Katalunio, al la supera policestro k al la Centra Registaro:

1. Mia edzo estis retenita de du homoj, kiuj diris, ke estas agentoj de la polico. Mi postulas de la polico, ke ĝi farau esplorojn necesajn por ekscii kie troviĝas li nune.

2. Mi petas la policon seiigi al mi, ĉu mi estas retenita kiel garantiulino por mia edzo. Se estas tia, la kazo, mi petas mian liberigon tujan, ĉar la reteno ne estus pravigebla.

3. En kazo, ke mi ne estas retenita kiel garantiulino, mi petas, ke post kvarmonata reteno (10 tagoj en la "grupo de la informo", 9 semajnoj en la ŝtatdelegejo" k pli ol 50 tagoj en la virinkarcero) oni prezentu formalan akuzon k realigu ekzamenon.

En kazo, se mi ne ricevos respondon en periodo de 8 tagoj mi vidos min devigata deklari malsatstrikon. Mi disponas pri la morala apogo de miaj kamaradinoj, retenitaj kiel mi ekde 4 monatoj sen akuzo k ekzameno. Mi sukcesis abstenigi ilin momente pro tia striko.

Julia Laudau. — Virinkarcero, strato Kortes, Barcelono.

Ĉi letero restis sen respondo k la kamaradino Julia Landau komencis malsatstrikon la 10an de Novembro."

* * *

La granda hispana pentristo Pablo Picasso forveturis al Nov-Yorko por partopreni la Internacian Kongreson de la Pentristoj, kiu okazos en la lastaj tagoj de Decembro.

* * *

La 7an de Decembro 15 faŝistaj aeroplanoj bombardis laboristajn kvartalojn, ĵetante plurajn bombojn. Kelkaj laboristaj domoj estis komplete detruitaj k aliaj difektitaj grave. Sub la detruaĵoj pereis pli ol 50 homaj estaĵoj, la plejmulto el ili maljunuloj k infanoj. Pli ol 100 estis vunditaj. Inter la viktimoj figuras ankaŭ la gazetisto Bisa, kiu lasttempe estis tradukanta por "Solidaridad Obrera" la verkaĵon "Mi fidas" de Vilaplana.

* * *

La gazeto "Cultura y Acción", organo de la C. N. T. de Aragon, kiu malaperis provizore pro la vandalecaj fiagoj de la komunistaj aventuristoj, reaperis. Adreso: "Cultura y Acción", Alcañiz, Hispanio, Via Cerbere.

* * *

En Alcañiz okazis plenkunveno de la sindikatoj de la regiono. Estis prenitaj la sekvantaj rezolucioj:

1. Pliintensigi la kunagadon kun la ceteraj antifaŝistaj sektoroj.
2. Pliintensigi la laboron rilate al la enkarcerigitaj kamaradoj ĝis kiel eble plej vastaj limoj.
3. Inviti la sindikatojn k la membrojn al donacoj por la regiona organo "Cultura y Acción".

* * *

La 9an de Decembro la Nacia Komitato de C. N. T. havis kunvenon. Jen la ĉefaj punktoj, kiuj estis pritraktitaj.

La subsekretario informis la Nacian Komitaton super la vizito de multnombra komisiono da reprezentantoj de la sindikataj organismoj el Marseille, kiuj venis al Hispanio alportante nutraĵojn kiel donaco al la frataj laboristoj k kun la celo viziti kelkajn frontojn k kolektivigitajn mastrumejojn. Por la plej bona atingo de ties deziroj la Komitato tuje metis sin al ties dispono.

Oni informis pri la ricevo de donaco de 1.100 pesetoj por la Milicanara Solidaro je la nomo de "Sep Antifaŝistoj". La donaco estis tuj sendita al la Nacia Komitato de S. I. A.

Oni tralegis plurajn telegramojn ricevitajn pri la morto de la membro de la Nacia Komitato, kamarado Claro J. Sendón mortinta en Nov- Jorko, kie li estis realiganta propagandon por mandato de nia organizo.

La Sindikato de Variaj Oficioj de San Luiz (Menorca) komunikas, ke kunveninte, unuanime decidis peti sian aliĝon al C. N. T. Oni akceptas ĝies aliĝon laŭcirkonstance al la Kataluna Regiono.

La Komitato restas informita k satisfakciita pri la agado, kiun disvolgas la batalantoj, pri kiuj disponas ni en Ekstremadura k pri la de tago al tago pli bona medio k pli grandaj simpatioj de la laboristoj

de tiu regiono al C. N. T. Oni decidis gratuli ilin k priatenti ties proponojn kun la plej ebla rapideco.

Oni legas k aprobas la informon, kiun super la Regiona Plenkunveno de la Kamparanoj k Kolektivigitaj Mastrumejoj de Levante (Valencia) prezentas la delegato de tiu Komitato kamarado Rueda Ortiz.

Oni nombris por partopreni, en la reprezento de la Nacia Komitato, al la Regiona Plenkunveno de Aragon, kiu komencos sian laboron la 11an de Decembro en Alcañiz, la kamaradojn Macario Royo k Segundo Blanco.

La Komitato estis informita, ke komencis en Parizo sian laboron la Eksterordinara Kongreso de A. I. T. (Internacia Laborista Asocio) kun la maksimuma priatento antaŭ ĉio de la intervenoj, kiujn devas havi la Hispana Delegataro.

Oni legas k aprobas la prijuĝon al la 10 punkto de la Tagordo de la Nacia Plenum-Komitato super la "Neceso atingi al la Administrada Centrigo de la Ekonomio". Raportis la kamarado Cardona.

* * *

La Federacio de la Liberaj Virinoj reaperigis sian organon "Mujeres Libres" (Liberaj Virinoj) en formato de revuo. La lasta estas 54 paĝa k riĉe ilustrita. En ĝi partoprenas kiel kunlaborantinoj la floraro de la hispana liberecanina movado.

* * *

**"Cultura Proletaria" en sia numero de la 13 de Novembro skribas:**

**"Ni ne parolas pri Rusio nek pri Germanio, nek pri Italio. Ni parolas pri Hispanio. En Hispanio estas pluraj miloj da antifaŝistoj, kiuj putras en la karceroj, dum multaj faŝistoj vagas libere tra la stratoj de la urboj, farante sian porkecan laboron preskaŭ sub la nazon de la registaranoj.**

**La anarkistoj entreprenis kampanjon pri amnistio de ĉiuj antifaŝistoj, kiuj suferas enkarcerigon pro deliktoj "iuj el kiuj kun iometa graveco, k poste fremdaj al politika signifo kontraŭa al la reĝimo". Estas multaj tiuj kiuj estas pretaj doni sian vivon por la neniigo de la faŝismo k ne povas fari tion pro tio ke estas en la karceroj, pro tio ke ignoris iun leĝon burĝan, neniun leĝon naturan aŭ leĝon popolan. Ĉiuj grupoj k organizoj havas anojn en la karceroj, k kiuj demonstras, ke ne estas kontraŭaj al la reĝimo k estas pretaj bati la faŝismon, devas esti liberigitaj por ke la afero de la popolo havu pli da defendantoj. Tio estas justa devo, k nur la blindigitaj k la embuskitaj faŝistoj insistas, ke tiuj elementoj plu restu en la karcero. Estas horo por la liberigo de ĉiuj antifaŝistoj. La amnistio ne devas prokrastiĝi eĉ unu tagon! Ĉiuj por la amnistio!"**

## INFORMEJO

K-do J. Buter, Hudsonstraat 168, II, Amsterdamo W, interesiĝas pri sia korespondinto Luis Gomeŝ el Barcelono. La sama estas peta skribi je la nova adreso.

La esp. Klubo, la Hispana Helpkomitato k Faksindikata ĉeforganizo en Sôdertâ lje meze de Januaro aranĝos ekspozicion antifaŝisman. Ni insiste petas ĉiuspecan materialon, ekz. librojn, broŝurojn, gazetojn, afiŝojn, flugfoliojn, insignonjn, statistikojn ktp. Ni resendos la aĵojn se estas dezirate. Adreso: Karl Axelsson, Dalgatan 7 B.nb, Sôdertâlje, Svedio.

* * *

K-do G. Kordenoordt deziras korespondi kun hispanaj kamaradoj laŭeble frontanoj. Respondo garantiata. Adreso: G. Kordenoordt, Spalrenburgstraat 69, Den Haag, Nederlando.

* * *

Bulgara kamarado volas korespondi kun alilandaj kamaradoj pri nia movado, arto ktp.

Skribu al: Peter Vasilev, artisto, Nacia Teatro, Varna, Bulgario.

* * *

Korespondenca Centro Internacia, Helmerstraat 22, Amsterdamo, havigas ĉiuspecajn korespondadresojn al la ĉiulandaj esperantistoj pri ĉiuj temoj. Petu tuj detalojn!

## LETERUJO

Dirk van Pryn, Kyfhuizen. Dankon. Ni utiligos la adreson por perado.

Viktor Rossenfosse, Beyne Heusay, Belgio. Dankon pri la res. kup. Pri esperanta propaganda materialo ni ne disponas nun al nun. Tamen por la hispanaj infanoj kiuj rifuĝis al via vilaĝo; ni sendas plurajn ekzemplerojn de la porinfana revuo "Porvenir".

Klas Karlsson, Ryd. Dankon. Utiligita.

O. H. Anderson, Sôdertâlje. Ni ĝojegas k elkore gratulas vin, ke vi trafis ekkoni pri la veraj provokintoj de la Majaj okazintaĵoj. Estas nepridiskutebla fakto, ke la komunistoj ĉiuflanken semadas mensogojn, kalumniojn tendence elstarigi sian partion, kiel unu sola ekzistinda. Sendube, kiel vi rajte supozas, post provo nuligi tiel nomataj "trockianojn" ili klopodos nuligi ankaŭ la socialdemokratan movadon. La artikolo de Dimitroff en Humanité estas aŭgura simptomo. La libron de Huxley "Blind en Gaza" ni dankeme akceptos.

G. Carlsson, Kanado. Sekvas letero.

L. Auguste, Brest. Ni priatentis la novaĵojn el via letero plejzorgeme. Ni transdonos al Soli anoncon pri la parencoj de la hispana rifuĝintino. La neĝusta noto de via adreso rezultis pro la nelegebla subskribigo. Oni ja devas legeble noti sian adreson.

Barry, Londono. Dankon pri la res. kup.

H. Bellefroiv, Liege. Dankon pri la res. kup. Ĉiuj ricevitaj bonorde. La mankantaj al vi numeroj sendotaj. Ĉies nericevo estas atribuenda al dumvoja forperdiĝo.

Woller Bohman, Sôdertâlje. Regule sendata. Pri korespondanto ni prizorgos.

## Deponejo "INFORMA BULTENO"

| | |
|---|---|
| La Sindikato de Alfla, Svedio ... ... ... ... ... | 5 sv.kr. |
| La Sindikato de Slottbron, Svedio ... ... ... ... | 11 sv.kr. |
| La Sindikato de Gustaf, Svedio ... ... ... ... | 1 sv.kr. |
| La Sindikato de Blôlberget, Svedio ... ... ... | 12 sv.kr. |
| La Sindikato de Vânersborg, Svedio ... ... ... | 2 sv.kr. |
| La Sindikato de Guldsmedshyttan, Svedio ... | 5 sv.kr. |
| La Sindikato de Nykôping, Svedio ... ... ... ... | 5 sv.kr. |
| Unu el Stokholmo ... ... ... ... ... ... ... ... | 1 sv.kr. |
| Guerinot, La Houssaye, Francio ... ... ... ... ... | 10 fr.fr. |
| J. Sabaté, Buenos Aires ... ... ... ... ... ... ... | 45 fr.fr. |
| Charles Blot, Fougere ... ... ... ... ... ... ... | 5 fr.fr. |
| Pierre Thomas, Beautheil ... ... ... ... ... ... | 5 fr.fr. |
| Henriko Deŝuiter, Barbin ... ... ... ... ... ... | 10 fr.fr. |
| E. Rossignol, Le Havre ... ... ... ... ... ... | 15 fr.fr. |
| Laborista esp. Grupo de Marseille ... ... ... | 25 fr.fr. |

Al ĉiuj ni esprimas sinceran antifaŝistan dankon!